

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 13.3.2013

Urbo Satu Mare en Transilvanio

Oldřich Arnošt Fischer – Gabriella Stier

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 13-an de marto 2013

Satu Mare (hungare Szatmárnémeti, germane Sathmar) estas urbo kun 115 000 da loĝantoj, kiu situas en Transilvanio, nord-okcidenta parto de Rumanio. (**Bildo 1**) Bedaŭrinde pri Transilvanio oni en Ĉeĥa Respubliko nur malmulte scias.

Kiel oni povas veturi en urbon Satu Mare? El Brno matene iradas rapidtrajno Petrov en Budapeŝton. Oni devas ŝanĝi trajnon en Budapeŝto kaj Debreceno. Lima hungara stacidomo estas Nyírábrány kaj lima rumana stacidomo estas Valea lui Mihai. Por eniro en Rumanion oni bezonas nur personan legitimilon. La veturado daŭras pli ol dek du horojn kaj trajnbileto kostas ĉirkaŭ 1500 kronojn. Distanco inter Brno kaj Satu Mare estas ĉirkaŭ 650 km, kiel la distanco inter satu mare kaj rumania ĉefurbo Bukureŝto.

Satu Mare estas urbo situata en ebena apud rivero Someŝo (rumane: Someș, hungare: Szamos). (**Bildo 2**) La rivero estas tre poluita kaj povas kaŭzi inundojn. Granda inundo estis ekzemple en la jaro 1792. Lasta granda inundo okazis la 14-an de majo 1970, kiam unu triono de distrikto kaj du

trionoj da la urbo estis inunditaj. Tiam 125 000 da hektaroj de agrokultura tereno kuŝis sub akvo, ofte eĉ du- aŭ trifoje. Akvonivelo en suba parto de la urbo atingis 2 metrojn. En la urbo, kiu estis tute izolata, ĉesis la voja kaj fervoja cirkuladoj. Ruiniĝis kompletaj stratoj, centoj da domoj. Mortis 56 homoj kaj 200 000 da bestoj.

La urbo havas interesan historion. Pejzaĝo estis setlita jam en bronzepoko. (**Bildo 3**).

Loĝantoj de nuntempa Rumanio, dakoj, subgvide Burebista (kiu mortis en la jaro 44 antaŭ Kristo) kaj pli poste Decebal (87-106) batalis por ilia libereco kontraŭ Romianoj. Militestro Marcus Ulpius Traianus (53-117) en la jaro 106 venkis Decebalon kaj konkeris urbon Sarmizegetusa. Kolono de Traianus en Romo estas ornamita per scenoj de milito kontraŭ dakoj.

Jam antaŭ la alveno de hungaroj (896) ekzistis en loko de nuntempa Satu Mare fortikaĵo. Tiu fakto estis menciita de kronikisto Anonimo (Anonymus) en la kroniko „Gesta Hungarorum“. En dokumentoj ekzistas informoj, ke ĉirkaŭ jaro 1000 Gizella, edzino de Sankta Stefano (970-1038), reĝo kaj fondinto de hungara ŝtato (**Bildo 4**), enlokigis germanojn en ĉi tiun teritorion.

Satu Mare formiĝis de unuiĝo de du urbetoj (kolonioj) Szatmár kaj Németi. Nomo Szatmár povas deveni de la germana vorto Salzmarkt (foirejo de salo) kaj nomo Németi (hungare „német“ signifas germano, simile kiel ĉeĥe „Němec“) atestas pri germana setlado. La urbo servis kiel reĝa fortikaĵo kaj sala deponejo. Tie oni gardis la salon el transilvaniaj salminejoj kiel provizo de reĝa kortego.

Malgraŭ ke Satu Mare festis la 1000-an datrevenon de ĝia fondado en la jaro 1972, vizitantoj apenaŭ povas vidi multjarcentajn konstruaĵojn. Urbocentro kaj ĝia ĉirkaŭaĵo gajnis hodiaŭan aspekton nur en la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Kial? Loĝantoj konstruis domojn nur el argilbrikoj kaj ligno en pasinteco. La argilbrikoj disfalas en akvo. Tial argilbrikaj konstruaĵoj estis detruitaj dum inundoj. Lignaj konstruaĵoj fariĝis viktimoj de multenombraj fajregoj. Multfoje la urbo estis detruita

de turkaj, tataraj, polaj, aŭstraj kaj kurucaj taĉmentoj. Loĝantaro estis dekumita per epidemioj kaj malsatego. Tataroj ruinigis la fortikaĵon en la jaro 1241.

Post la jaro 1460 la urbo estis propraĵo de reĝo Matiaso Korvino. (Ni scias, ke tiu reganto estis bofilo de bohemia reĝo Georgo de Poděbrady kaj pli poste (1469) ankaŭ reganto super Moravio.) Dum lia reĝado oni konstruis en Satu Mare kvarangulan kastelon sur la ĉiuj anguloj po unu turo.

En la jaro 1543 la fortikaĵo apartenis al familio Somlyai Báthory, kiu fosigis novan fluejon por rivero Someŝo kaj plifortigis fortikaĵmuron. Tiel la fortikaĵo troviĝis sur la insulo ĉirkaŭita de rivero Someŝo.

En la jaro 1565 la fortikaĵo estis okupita de aŭstra imperiestra armeo.

En la jaro 1622 Gábor Bethlen (1580-1629) ricevis la urbon kaj la fortikaĵon. Li estis unu de gravaj regantoj de Transilvanio. Li regis sukcese super sia lando, kiu estis situata inter du imperioj, aŭstra (habsburga) kaj turka. Tiu periodo estas nomata ora epoko de Transilvanio.

György Rákóczi I (1593-1648) gajnis Transilvanion en la jaro 1645.

En la jaro 1657 polaj taĉmentoj sieĝis la fortikaĵon kaŭzante grandajn detruojn. Inter jaroj 1659-1663 pereigis kaj bruligis la urbon turkoj kaj tataroj. Kvin mil da tataroj atakis la urbon kaj fortrenis milojn da homoj. En la jaro 1664 Leopold I iĝis posedanto de la fortikaĵo, aŭstraj soldatoj sisteme rabadis la loĝantaron de la urbetoj.

Kelkaj hungaraj nobeloj subgvide Ferenc Rákóczi II (1676-1725) (**Bildo 5**) ekribelis kontraŭ Habsburgoj en la jaro 1703. Ambaŭ urbetoj, Szatmár kaj Németi, estis bruligitaj. En kuruca armeo batalis pli ol unu jaro ankaŭ slovaka nacia heroo Juraj Jánošík (1688-1713). Ribelantoj, kurucoj (krucanoj), estis komence sukcesaj, sed post batalo apud Trenčín (1708) oni devis intertrakti en Satu Mare pri paco. Ferenc Rákóczi II detruigis la fortikaĵon en la jaro 1711. En tiu jaro grafo Sándor (Alexander) Károly, kuruca generalo, (**Bildo 6**) kun habsburga militestro grafo János Pálffy

konkludis Satmaran Pacon, kies kondiĉoj pardonis hungarajn nobelojn kaj plifortigis poziciojn de Habsburgoj en Hungario.

Du urbetoj divigitaj longtempe de eta branĉo de rivero Someșo post la Satmara packontrakto en la jaro 1712 unuiĝis kaj ekde la jaro 1715 igis liberan reĝan urbon.

Kaŭze de oftaj incendioj en la jaro 1798 oni malpermesis en la stratoj kaj kortoj fumi pipojn.

En la printempo de la jaro 1848 formiĝis volontaj kompanioj. Generalo Jozefo Bem (1794-1850), pola oficiro, generalo de la hungara armeo dum la hungara revolucio kaj batalo por la libereco en la jaroj 1848-1849, en ĉefplaco de Szatmárnémeti starigis siajn taĉmentojn en militordo kaj de tie ekiris en la transilvanian militaron. Hungara revolucio estis venkita de aŭstroj kaj rusoj apud Világos en la jaro 1849 kaj kruela aŭstra generalo Julius Jakob von Haynau ordonis ekzekuti hungaran ĉefministron Batthyány-n kaj 13 hungarajn generalojn.

Tiranisma sistemo, kiun aŭstroj enkondukis post malvenko de hungara revolucio, ĉesis en la jaro 1867. Politika kompromiso de hungaraj kaj aŭstraj politikistoj (aŭstra-hungara interkonsento) formis dualismon, konstitucian monarĥion, kiu ebligis postvivon de ŝtatformo dum la sekva duonjarcento, sekvis pli trankvilaj tempoj. La urbo komencis evolui. Estiĝis brikfabriko, buĉejo, lignotabulfabriko. Pretiĝis la stacidomo, urba ĝardeno (Kossuth kert), hotelo Pannonia (Dacio), Turo de Fajroestingistoj, sistemo de akvokondukto ktp.

Trianona interkonsento (1920) decidis, ke Transilvanio apartenos al Rumanio.

La dua mondmilito kruele influis vivo de la loĝantoj de Satu Mare. Judoj kreis 24.9 %-ojn da loĝantoj en jaro 1941. Sed en la jaro 1944 el Satu Mare estis deportitaj 18 000 da judoj en koncentrejojn. (**Bildo 7**) Faŝista krimo ŝoa (holokaŭsto) kulpis pri morto de ses milionoj da judoj en tuta Eŭropo! Post la milito 5000 da germanoj (ŝvaboj) el Satu Mare estis deportitaj en Siberion. Nun la urbo havas ĉirkaŭ 115 000 loĝantojn, el kiuj la nombro de judoj estas sub 100 da homoj. En

la sesdekaj jaroj preskaŭ ĉiuj judaj familioj elmigris en Israelon. Nombro de la rumanoj kaŭze de enlokigo de la aliaj regionoj inter jaroj 1930-2011 kreskis de la 31 % al 62 %. Samtempe procentoj da hungaroj iĝis de la 42 % al 35 % kaj en la urbo loĝas 3 % da germanoj.

Ne nur Satu Mare, sed tuta rumana lando, suferis dum diktatora reĝimo de Nicolae Ceausescu. **(Bildo 8)**. Dum Velura Revolucio (1989) ni elkore deziris al Rumanio liberecon. Ekzemple en Brno en Placo de Libereco moraviaj aktivuloj kolektis monon por materiala helpo al sendiktatora Rumanio. **(Bildo 9)**

Komunaj problemoj de Rumanio, Hungario kaj Ĉeĥio estas fumantoj, senhejmuloj, senlaboruloj, malriĉeco. Multe da homoj havas aŭtomobilojn. Rumanaj ŝoforoj estas pli respektplenaj al piedirantoj ol ĉeĥaj ŝoforoj.

Norda Teatro en Satu Mare **(Bildo 10)** havas du grupojn da aktoroj, kiuj ludas aŭ en rumana aŭ en hungara lingvoj. La teatro suferas de manko de financoj.

En urba parko Grădina Romei (Kossuth Kert) rezidas junaj natursciencistoj **(Bildo 11)**, kiuj protektas birdojn kaj vespertojn.


En Regiona Muzeo oni povas admiri rumanan **(Bildo 12 kaj 13)** kaj ŝvaban folkloron **(Bildo 14)**, iomete da ukrainan kaj hungaran, kaj ricevi informojn pri la historio de ĉi tiu regiono. Bela estas la Sinagogo. **(Bildo 15)** En la urbo rezidas romkatolika episkopejo kaj multe da preĝejoj, ekzemple romkatolika katedralo **(Bildo 16)**, romkatolika preĝejo Kalvario **(Bildo 17 kaj 18)**, ortodoksa katedralo **(Bildo 18 kaj 19)** kaj grekkatolikaj preĝejoj **(Bildo 20 kaj 21)**. El statuoj estas tre bela statuo de Sankta Elizabeto **(Bildo 22)**.

Satu Mare estas moderna, interesa urbo **(Bildo 23 kaj 24)**, kiu estas vizitinda, se vi veturos en Rumanion. **(Bildo 25)**.

Literaturo

- Anonimo (2004): Szatmárnémeti. Várostörténet egy falevélen. Identitas.
- DORAZIL, O. (1997): Světové dějiny v kostce. 4-a eld., Vimperk kaj Prago, Papyrus kaj Jeva, 535 paĝoj.
- FISCHER, O.A. (2011): Husanaj militoj kaj bohemia reĝo Georgo de Poděbrady. Prelego por la Esperantista Klubo en Brno, <http://www.medy.cz/brno-esperanto/husanaj-militoj.html> .
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky českou minulostí. 2-a vol., 1-a eld. Prago, Baronet, 454 paĝoj
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1998): Toulky českou minulostí. 7-a vol., 1-a eld. Prago, Via Facti, 222 paĝoj.
- JIROUŠKOVÁ, L. (1971): Poŝatlaso de la mondo. 1-a eld., Prago, Kartografie, 55 paĝoj.
- LAUER, K. (2008): Rumunsko. 2-a eld., Munĥeno, Mairdumont, 132 paĝoj.
- MUHI S. (2003): Szatmárnémeti. Városismertető. A Szatmári Turisztikai Technikum kiadványa.
- MUHI S. (2008): Muhi Sándor. Építészet Szatmáron. Scriptor alapítvány.
- PINTÉR, Z., CSABAI, I. & CSABA, I. (2011): A történelmi Magyarország szépségei. 1-a eld., Kisújszállás, Pannon-Literatúra Kft., 192 paĝoj.
- ROBERTS, J.M. (1999): Ilustrované dějiny světa. 3-a vol. Starověký Řím a antický Západ. 1-a eld., Prago, Knižní klub kaj Balios, 192 paĝoj.
- STIENS, R. (2008): Maďarsko. 4-a eld., München, Mairdumont, 136 paĝoj.

Kie estas Satu Mare? – En Rumanio.



Rivero Someșo (rumane: *Someș*, hungare: *Szamos*)



Homoj de bronza tempo



Statuo de Sankta Stefano



Ferenc Rákóczi II (1676 – 1725)



Alexander Károlyi (1669 – 1743), statuo en urbo Carei



Monumento de 18000 da judaj viktimoj de faŝismo (1944)



Diktatoro Nicolae Ceausescu kaj lia edzino Elena (afiŝo)



Solidareco kun Rumanio en la jaro 1989. Moraviaj aktivuloj en Placo de Libereco en Brno kolektas monon por helpo al rumania popolo.



Norda Teatro en Satu Mare



Rezidejo de junaj natursciencistoj en urba parko Grădina Romei (Kossuth Kert)



Șafpaștisto



Tablo kun pano



Švaba čambro




Sinagogo




Romkatolika katedralo nokte




Romkatolika preĝejo Kalvario



Ortodoksa katedralo



Ortodoksa katedralo nokte



Grekkatolika preĝejo



Grekkatolika pređeje



Romkatolika preĝejo kaj Sankta Elizabeto



Strato en Satu Mare



La sama strato nokte



Bazaro en Satu Mare

